Georg Trakl,

# Aŭtuno transfigurita

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Finiĝas pompe nun la jar'
kun ora vin' kaj frukt-riceco.
Silentas ĉie la arbar',
nin akompanas en soleco.

Nun klinas jam la suno sin.
Vi sonoriloj de vespero,
nin kuraĝigu je la fin'!
Forflugas birdoj tra l' aero.

Tre belajn bildojn vidas ni,
sur la rivero veturante.
La temp' de l' amo estas ĝi –
Ripozas ni nun silentante.

*Traduko de la Germana poemo "Verklärter Herbst" de* Georg Trakl *(∗1887-02-03 – †1914-11.03) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-607-1222 (2012-10-08 22:22:50)*

*Esperantigis (iom libere): Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff) en 2001-10-23 laŭ la origina germanalingva teksto.*